


# Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 27.3.2013

## Martin Novosad

*Miroslav Malovec*




Martin Novosad, poste budhana monaĥo Njanasatta Thero en Cejlono kaj grava sciencisto, estis ankaŭ esperantisto kaj laŭ informo en la antaŭparolo de lia lernolibro de budhismo li prelegis la 11-an de januaro 1938 en esperantista klubo en Brno pri iu budhana temo. Bedaŭrinde, informoj el tiu jaro pri nia movado tute mankas, do ni ne povas konfirmi verecon de tiu informo, ankaŭ la teksto de la prelego ne konserviĝis.

Martin Novosad naskiĝis la 25-an de januaro 1908 en Moravio. La menciita lernolibro asertas, ke li naskiĝis en Tyrňany, sed neniu enciklopedio konfirmas, ke tia vilaĝo ekzistas aŭ ekzistis. La historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio verkita de Kamarýt indikas, ke li naskiĝis en

Vizovice. Do verŝajne li devenis el tiu regiono.

Martin Novosad devenis el 12 gefratoj, la familio estis malriĉa, tial li mem devis perlabori monon por siaj studoj. Li servis ĉe kampulo, poste dum kvar jaroj li lernis metion de tajloro en Vizovice, ok jarojn li laboris kiel tajlora helpanto en Ostrava-Kunčice kaj fine kiel tajlora submajstro en Vizovice. Samtempe li sukcesis studi kurson por instruistoj, lerni fremdajn lingvojn kaj serĉi pli bonan laboron en Vieno, Hamburgo, Berlino, fine li trovis postenon de lingvoinstruisto en Parizo.



Dum siaj vojaĝoj li konatiĝis kun budhismo kaj estis vere kaptita de ĝiaj ideoj. En unu budhana societo li enamiĝis al germana nobelino, edziĝis al ŝi, sed baldaŭ ili divorcis kaj ŝi konsilis al li forvojaĝi en Azion, kie estas fontoj de budhismo. Kiel tridekjarulo, nelonge post la supozata prelego en Brno, li forvojaĝis al Cejlono, nuntempa Srilanko, grandega insulo ĉe la suda ekstremo de Hindio. Finance lin helpis lia amiko Leopold Procházka. Lia patro mortis jam en 1927, la patrino en 1936, tial li decidis resti en Cejlono kaj fariĝi budjhana monaĥo. Li akceptis la nomon Nyanasatta Thera, kiu iomete memorigas lian ĉeĥan nomon (Novosad - Nyanasatta), parte lian unuan instruiston de budhismo Nyanati lóka Maháthera, samtempe la sinhalajn vortojn Nyana (saĝo, scio) kaj Satta (estaĵo).

En 1940 li venis al loko en montara regiono, nomata Roka Ermitejo, li nomis ĝin Verda Ermitejo, kaj instruis tie sinhale lokajn vilaĝanojn. Tiuj eĉ kredis, ke li estas ilia antaŭulo, kiu renaskiĝis en Eŭropo por povi al ili peri la instruon de Budho.

Post la milito li korespondis kun la ĉeĥa esperantisto Josef Ěebiček (tradukinto de R.U.R. de Karel Čapek), kiu aperigis lian leteron en la nova gazeto Esperantista jam en 1946 sur paĝo 20. Tie ni legas:

*Letero de samideano iam M. Novosad. Pluraj niaj legantoj rememoros lin. Li vivis siatempe en Vizovice, poste en Bratislava, vizitis Berlinon, edziĝis kaj maledziĝis, vivis en Trnava, aliĝis al budhismo kaj en jaro 1938 elmigris en insulon Ceylon, kie li estis akceptita kiel »samanevo« en budhanan monaĥejon en »Hermitage Island« en Dodanduwa en marto 1938 kaj akceptis nomon Nyanasatta. Nun venis de li poŝtkarto al s-o J. Ěebiček en Olomouc datumita la 27. XII. 1945, en kiu la nuna Rev. C. Nyanasatta en »Kolatenna Hermitage« en Bandarawela skribas:*

*Post la forpaso de Mondmilito mi rekomencas mian Esperanto-korespondadon per la poŝtkarto al Vi. Kiel Vi fartis dum la lastaj ses jaroj? Mi estas feliĉa, ke mi povas informi ĉiujn miajn ĉeĥoslovakajn, kaj internaciajn amikojn, ke mi vivis feliĉe kaj kiel liberulo, spite la malamikan okupom de ĈSR. Mia estraro kaj la registaro ne malhelpis mian liberecan vivon kaj agadon. La tempom mi pasigis utile per plua studado, instruado, paroladoj, prelegoj kaj predikoj. Duonjaron mi eĉ estis regula instruisto de kelkaj fakoj en angla-lingva gimnazio. Pro milito profesoroj kaj instruistoj malsufiĉis. Nune mi havas kvazaŭ privatan lernejon kun 20 lernantoj inter 8-20 jaroj. Krom la anglan mi ankaŭ instruas la lingvon de la popolo: la sinhalan, Mi prelegas, parolas kaj predikas angle kaj sinhale. La unuajn 5 jarojn mi prelegis angle kaj uzis interpretistojn, nun mi ne bezonas tradukiston. Mia vivo estas feliĉa, aktiva kaj kontemplativa. Mia sano estas bona. Kia estas la Esperanto-vivo nun? Mi intencas verki lernolibrojn kaj legolibrojn por nia popolo ĉi tie kaj komenci publikan instruadon de Esperanto, simile al Cseh-pastro. Mi varbis kelkajn monaĥojn kaj instruis ilin. Se mi vivos, iun tagon vi aŭdos Esperanto-predikon de l' Colomba stacio. Korajn salutojn al vi kaj al ĉiuj amikoj! Vi faros grandan servon al Esperanto kaj mi, se vi publikigos mallongan anoncon en Ligilo, Progreso, Esperanto, Heroldo ktp, pri la enhavo de mia karto. Mi ne povas trovi la precizan adresom de E-redakcioj kaj miaj Esperanto-amikoj, al kiuj mi ne respondis dum la ses jaroj. Kie estas Prof. M. Lukáš kaj Dr. St. Kamaryt? Fartu bone! — Kun koraj salutoj via sindona C. Nyanasatta.*

Poste en la sama gazeto sur paĝo 95 aperis jena informo:

*Ĉeĥo iam M. Novosad nun C. Nyanasatta, abato en budhista monaĥejo en Ceylon (Kolatonna Hermitage), kiun ni salutis per artikoleto sur paĝo 20, aperigis en anglalingva budhisma revuo The Bosat (n-ro 4 el IX jarkolekto) sur paĝo 93 artikolon »El Praha al Colombo«, en kiu li priskribas tre impresive, kiel li jam kiel infano dediĉadis sin al kulto de izoleca meditado sentante sin inter la samgentanoj kaj samfamilianoj kiel malbela anasido. Tiun senton, ke li ne apartenas inter la homoj de Eŭropo, li posedis daŭre en diversaj partoj de tiu kontinento. Lia edzino, kun kiu li konatiĝis en Hamburg kaj kiu sin sentis tiam same izola, post maledziĝo rekomendis al li studadon de budhismaj doktrinoj, en kiuj li trovis medion respondan al sia mensa aparteco, kaj li decidiĝis enprofundi sin en tiun religion kaj en ĝian*

*studadon. Esperanto estis por li plej utila el ĉiuj dek lingvoj, kiujn li studis. Nun li laboras kiel budhisma misiisto inter la popolo Ceylona. En letero al s-ro J. Řebíček en Olomouc li promesas, ke li uzos Esperanton por propagando de ideoj de la popolo Ceylona kaj por disvastigado de ideoj budhismaj. Ni salutas lin sincere.*

Eble pro la politikaj ŝanĝoj en nia lando en 1948 ni ne havas pliajn informojn, ĉu li plu korespondis kun niaj samideanoj. Sed ni scias el aliaj fontoj, ke li verkis du broŝurojn en Esperanto, nome *La koro de budhismo* (1957) kaj *Dudek kvin jarcentoj de budhismo* (ĉ. 1960). La unuan li verkis ankaŭ angle kaj ĝi iĝis bazo de lia poste granda lernolibro anglalingva pri fundamentoj de la budhismo, *Basic Tenets of Buddhism*. Sub la titolo *Základy buddhismu* tradukis ĝin en la ĉeĥan la fama, antaŭ nelonge forpasinta tradukisto Dušan Zbavitel, la antaŭparolon verkis alia ĉeĥa budhano Mirko Frýba. En tiu antaŭparolo estas mencio pri la prelego en nia klubo en 1938.

Martin Novosad kontribuis multe al la anglalingva Budhana Enciklopedio (Buddhist Encyclopedia), prelegis regule en la cejlona radio. En la 1960-aj jaroj vizitis lin ĉeĥaj hindologoj Ivo Fišer kaj Karel Werner, poste ankaŭ la famaj vojaĝistoj Jiří Hanzelka kaj Miroslav Zikmund. La lastajn monatojn antaŭ la morto, kiam li estis parte paralizita, zorgis pri li la jam menciita Mirko Frýba. Tiu informas, ke la korpaj restaĵoj de la respektinda Nyanasatta Thera estis kremaciitaj la 27-an de septembro 1984.

La sama aŭtoro ankaŭ rakontas, ke en sia Kolatena Ermitejo Novosad estis foje atakita de rabistoj kaj la teruritaj vilaĝanoj lin trovis la sekvan tagon katenita sur la planko. La rabistoj ne multon rabis, ĉar krom iom da manĝo li havis nenion. La vilaĝanoj kredis, ke li estas ilia samgentano, ĉar li parolis ilian lingvon, kaj ke li naskiĝis en Eŭropo nur por povi reveni al Cejlono al sia gento kaj instrui ilin. En sia esperantlingva verketo *La koro de budhismo* li nomas sian ermitejon Verda Ermitejo.

*Bildoj el Vikipedio*